Informilo de Marto 2016

Numero 21, Marto 2016

Universala Esperanto-Asocio markas Internacian Tagon de la Gepatra Lingvo

21 februaro. La 21-an de februaro, 1952, studentoj manifestaciantaj favore al rekono de la bengala lingvo kiel unu el la du naciaj lingvoj de Orienta Pakistano, nun Bangladeŝo, estis mortpafitaj de polico apud la Supera Kortumo en la ĉefurbo Dakha. En 1999 Unesko rekomendis rekonon de tiu ĉi dato kiel Internacia Tago de la Gepatra Lingvo, festanta la rajton de ĉiuj homoj uzi sian gepatran lingvon. En la jaro 2008 la Ĝenerala Asembleo de UN formale rekonis la iniciaton de Unesko.

Esperantistoj ĉirkaŭ la mondo hodiaŭ festas la Internacian Tagon de la Gepatra Lingvo, kiel ili faras ĉiujare. Fundamenta al la principoj de la parolantoj de Esperanto estas la ideo, ke multlingvismo, neniel malavantaĝa, konsistigas festindan pozitivaĵon, kaj ke lingva diverseco estas grava elemento en la konservado de kultura diverseco. La internacia lingvo Esperanto celas transponti lingvajn diferencojn dum ĝi permesas la floradon de tiuj diferencoj. Hodiaŭ, 90 procentoj de la lingvoj de la mondo riskas estingiĝon, plejparte pro altrudo de aliaj, pli grandaj lingvoj.

Ĉi-jare, la rekono de la Tago de la Gepatra Lingvo inkluzivas publikan feston en Kluekanmè, Benino, kunlabore kun la Benina Unesko-Komisiono – kun prezentoj de Esperanto en kelkaj lokaj lingvoj. Inter la agado en aliaj landoj trans la mondo estas publikigo kaj distribuo de Esperanto-traduko de la mesaĝo de Irina Bokova, Ĝenerala Direktoro de Unesko, okaze de la Tago, kaj aperigo de afiŝo, en Esperanto (vidu paĝon 2 de la nuna informilo).

Universala Esperanto-Asocio Aŭspicianto de Sesio pri Edukado de Rifuĝintoj

11 februaro. UEA estis unu el ses aŭspiciantaj organizaĵoj de podia sesio de neregistaraj organizaĵoj (NROj) ĉe la kunsido en Novjorko de la Komisiono de UN pri Socia Evoluigo. La sesio, “Edukado por la daŭripova inkludo de dislokitaj personoj,” okazis la 11-an de februaro sub aŭspicio de la Komitato de NROj pri Edukado, en kiu la UN-reprezentanto de UEA, d-ro Humphrey Tonkin, estas membro. Inter la aliaj aŭspiciantoj estis la Legio de Bona Volo, kiu utiligas Esperanton en sia eduka laboro.

Simpozio pri Lingvo kaj la Celoj por Daŭripova Evoluigo

10 februaro. Konata specialisto pri socilingvistiko kaj lingvopolitiko Suzanne Romaine, Profesoro pri Angla Lingvo en la Oksforda Universitato de 1984 ĝis 2014, faros la ĉefparoladon en Simpozio pri Lingvo kaj la Celoj por Daŭripova Evoluigo, kiu okazos ĉe UN Church Center, 777 United Nations Plaza, New York, ĵaŭdon kaj vendredon, 21-22 aprilo, 2016. La Simpozio emfazos la gravecon de lingvoj kaj dudirekta lingva komunikado en plenumo de la 17 Celoj. La Celojn aprobis la Ĝenerala Asembleo de UN en sia plej lasta sesio; ili restos validaj dum la periodo 2015-2030.

La Simpozio, kiun kunvenigos la Studgrupo pri Lingvoj kaj Unuiĝintaj Nacioj, kaj kiun sponsoros Universala Esperanto-Asocio, kune kun la Centro por Aplika Lingvistiko (Vaŝingtono), la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj, kaj aliaj organizaĵoj, prezentos inter siaj ĉefaj parolantoj ankaŭ Michael Ten-Pow, kiun oni lastatempe nomis Ĉefkonsilanto pri Multlingvismo en la Fako de UN por Mastrumado de la Ĝenerala Asembleo kaj Konferencoj.

Inter la aliaj parolantoj estos Lisa McEntee-Atalianis (Universitato de Londono), Carolyn Benson (Teachers College, Universitato Columbia), Rosemary Salomone (Jura Fakultato, St. John's University), kaj Kurt Müller (National Defense University). La plenan programon oni anoncos komence de marto.

La simpozio estas malferma al UN-personaro, anoj de naciaj misioj de UN, reprezentantoj de NROj, kaj la ĝenerala publiko. Informojn pri aliĝo trovu ĉe www.languageandtheun.org.

Oficejo de Universala Esperanto-Asocio ĉe Unuiĝintaj Nacioj:
777 United Nations Plaza, New York, NY 10017.
212-687-7041
www.esperantoporun.org

Office of the Universal Esperanto Association at the United Nations
777 United Nations Plaza, New York, NY 10017.

212-687-7041